FN PER ANC 47

n° 178 Novembro 1993

# ESPERANTO
# NORMANDA BULTENO

**unuiĝo de normandaj esperantistoj**

Redaktas: Pierre QUILLAUD 16, rue Lt Vaisseau Paris
76120 LE GRAND-QUEVILLY Tel. 35 69 66 09
Abon-Kotizoj: 45 Frankoj. Union des Espérantistes de Normandie
CCP 283 - 40 H ROUEN

## *NIA BULTENO*

*Someraj monatoj forpasis. Ni esperas ke multaj el vi agrable feriis kaj havis okazon praktiki Esperanton, renkontante fremdajn geamikojn aù partoprenante kongresojn.*

*Nia lasta bulteno aperis dum monato Julio. Ni atendis viajn kontribuojn por aperigi la nunan.*

*Kio estas la tasko de redaktoro?*
*- Kompili artikolojn senditajn de niaj membroj*
*- Tajpi ilin se ili estas manskribitaj*
*- Eventuale korekti ilin ( ne cenzuro sed gramatikaj eraroj )*
*- Resumi aù mallongigi ilin ( se necese)*
*- Enpaĝigi ilin*

*Redaktoro devas ankaù tajpi aù fotokopii informojn aperintajn en landaj aù internaciaj revuoj.*

*Kiujn artikolojn vi devas sendi al redaktoro?*
*- Informojn pri vivo de via grupo*
*- Impresojn pri kongresoj, internaciaj renkontiĝoj kaj vojaĝoj*
*- Spertojn pri propagando kaj instruado*
*- Prezenton de via landa aù internacia asocio ( FET, Katolikoj, Fervojistoj,ktp...)*

*Kiujn artikolojn vi devas eviti ?*
*- Literaturajn kaj teknikajn ( ĉar nia bulteno estas nur modesta ligilo )*
*- Polemikajn (car nia asocio malfermata al ĉiuj devas resti neùtrala )*

*Kiun lingvon uzi ?*
*Ni sendas gin al komencantoj kiuj bezonas bone kompreni informojn pri staĝoj pri kongresoj , pri abonoj. Do , franclinvaj informoj estas akcepteblaj.*

*Kiuj ricevas la bultenon ?*
*- ĉiuj membroj de nia unuiĝo kiuj pagas abonkotizon*
*- eks-membroj kiuj "forgesis " pagi abonon sed esperebIe decidos denove helpi nin.*
*- lernantoj,komencantoj*
*Ni petas grupestrojn kaj kursgvidantojn sendi al redaktoro liston de lernantoj .Ili ankaù informu pri forigotoj kiuj ne plu praktikas.*

*Resume :Normanda Bulteno devas esti ĉies laboro.*

*La Redaktoro*

# *NIA ASOCIO*

La " estraro" de l'Union des Espérantistes de Normandie ( ESPERANTO-NORMANDIE) s'est réuni le 2 Octobre 1993 chez nos amis Pottier à Yvetôt.Les principales décisions sont les suivantes :

- Il est nécessaire de renouveller en entier le bureau de l'union. Dans le prochain bulletin, il sera fait appel de candidatures. Nous demandons à chacun d'y réfléchir . Un rajeunissement du comité directeur redonnera plus de vitalité à notre région.

- Il est décidé d'organiser une assemblée générale au printemps; elle se tiendra au Havre ou à Rouen.

- Les finances de l'Union ne nécessitent pas d'augmentation de la cotisation fixée à 45 Francs depuis 1988. Au contraire, elle sera ramenée à 30 Francs pour ceux qui paient déjà une cotisation à un groupe local et à condition que le versement soit effectué globalement par le trésorier du groupe .Bien entendu,tout versement supplémentaire sera le bienvenu.

- Fédération Normande d'UFE : il est souhaitable que les responsables de la Fédération (Président, Trésorier, Secrétaire) soient les mêmes que ceux de l'Union (UNE) et qu'ils occupent la même fonction , sous réserve bien entendu d'être adhérents d'UFE et avec l'accord des autres membres d'UFE. Bien entendu, notre bulletin restera ouvert à tout communiqué d'UFE ,- et de toute autre association espérantiste-, comme nous le faisons jusqu'ici d'ailleurs.

- Kongreso de SAT-AMIKARO en Hérouville : La Organiz-Kongres-Komitato bone studis financojn esperante ekvilibrigi enspezojn kaj Elspezojn; ĝi timis deficiton sed feliĉe okazis profito kiu estos bone uzata por propagando. Duono da profito estis girata al SAT-Amikaro. Alia duono restis por Héruvil-grupo kaj UNE. Nia Normanda Unuiĝo ricevis de OKK subvencion da 2500 Frankoj.

# NUN LA KASISTO

Jen listo de kotizintoj por jaro 1993 :
Gesinjoroj Angenault, Bataille, Bessiere, Caron, Charron, Defrance, Dubois, Feret, Gibeaux, Guéroult, Guerre, Haulard, Helbert, Jouvin, Legros, Le Héricey, Le Mazurier, Loisel, Magerel, Martin, Maurice, Mendès, Michaud, Michel, Millet, Nicolas, Pottier, Quillaud, Quillet, Robiolle, Roblin, Saunier.
Se via nomo ne estas en tiu listo, tio signifas ke ni atendas vian ĉekon.

Nur 32 membroj pagis sian kotizon por 1993 ,kvankam ni sendas la bultenon al 100 personoj kaj al 25 asocioj !!!!

Kelkaj jam pagis sian 1994-kotizon.

Se vi estas membro de esperantista grupo,kaj se vi pagos vian 1994-kotizon pere de via grupa kasisto,vi povos profiti redukton. Legu ci-supre en la rubriko " Nia Asocio" la decidojn de la estraro.

Petro Kijo

# LA VIVO DE LA GRUPOJ

GRAND QUEVILLY-ROUEN :

Ĉiujaŭde de 17a 30 ĝis 19a 15, kunvenas en Centre-Socio-Culturel du Grand Quevilly,12 esperantistoj.Ili ĉeestas duagradan kurson, konversacias,lernas poemojn,aŭskultas sonbendojn,ktp...Tiu kunveno okazas en tre amika etoso.
Poste de 19a 15 gis 20a45, 4 personoj ĉeestas unuagradan kurson.
Bedaŭrinde,mankas aktivulo kaj kursgvidanto en Rouen-Centre.

PRESSAGNY-L'ORGUEILLEUX (EURE) :

Nia amiko Rémy Lebrun sukcesis aperigi en "Actualités Régionales de Paris-Normandie" (6a de Aŭgusto 93) interesan artikolon kun grava titolo " Mi parolas Esperante" kun foto de la libro : "La krabo kun oraj pinĉiloj"

HEROUVILLE SAINT CLAIR :

Dudeko da personoj kunvenas ĉiun mardon por ĉeesti duagradajn kursojn. De oktobro ĝis novembro, ni studos laŭ ĝenerala temo, nome : Hungario. Prelego pri la lando, studo de noveloj de Nemere kaj Szilagyi, poemo de Baghy, prezento de la hungara lingvo dank'al interveno de Hungara amikino.

La asocio Hérouville Espéranto deĵoris en budo kun ekspozicio kadre de loka festo de la asocioj. Kelkdekojn da vizitantoj ni akceptis kaj informis.

TSF 98 daŭre prezentas ĉiusemajne duonhoran elsendon pri nia internacia lingvo.

Ni organizis publikan kunvenon okaze de prelego ege interesa de Tyblewski , fama esperantisto de Pollando. Li faris elstaran prezenton pri la antaŭa kaj nuna situacioj en sia lando. Tiun prelegvojagon tre bone organizis U.F.E.

Ni ankaŭ gastigis Usonanon de Arizono, germanan paron kies edzo Ulrich Matthias longtempe gvidis la tutmondan asocion por la junuloj (TEJO), kaj polan paron de Silezio. La unua alvenis en Julio, la aliaj en Septembro.

Dominique Porta vojaĝis al nia ĝemela urbo Tiĥvin (apud St Peterburgo) , kaj Suzanne Boudet akceptos en oktobro sian korespondantinon alvenintan de la sama urbo.

Henri Rousseau dum 10 kunvenoj faros prezenton de la lingvo ĉe la Triaĝa Universitato de Caen.

Odile Masseron probable gvidos kurson en la sidejo de la fervojistoj, anstataŭ Gilbert Angenault, kiu nun prospektas ĉe la Junuldomo de Courseulles por inaŭguri novan kurson.

Ĉio okazas en kvieta kaj amika etoso.

raportas Yves NICOLAS

YVETOT : Ni funebras

*La 10 an de Oktobro , forpasis post longa kaj doloriga malsano, 54 jara, nia vicprezidanto S-ro Bernard SAUNIER , kiu estis unu el la plej malnovaj anoj de nia grupo.*

*Efektive,kiam, post dudekjara dormado, la grupo reviglîĝis kaj denove organizis kursojn en 1967, Sro Saunier tuj aliĝis al ili, kaj tri jarojn poste, sukcese trapasis Ateston pri Kapableco. Sed lia aktiveco ne limiĝis je la lernado de Esperanto : li ankaŭ multe praktikis la lingvon per korespondado kaj vojaĝado kaj partoprenis en 1969 la UEA-Kongreson en Helsinki kaj tiun de TEJO en Stokolmo.*

*En la loka vivo, Sro Saunier estis dum longa tempo la kasisto de nia grupo, kaj dum tiu periodo, li ludis gravan rolon en la preparado de SAT-Amikara Kongreso okazinta en Yvetôt dum Aprilo 1971, kaj regionaj kongresoj aŭ renkontiĝoj. Antaŭ kelkaj jaroj, li fariĝis vicprezidanto de la grupo kaj ĉiam restis fervora esperantisto.*

*Al lia edzino kaj al liaj gefiloj, ni adresas niajn plej sincerajn kondolencojn.*

ALIAJ GRUPOJ : La redaktoro atendas viajn raportojn.

## NIAJ LEGANTOJ SKRIBAS

Roger kaj Gisèle MICHAUD dankas kaj gratulas nin pro nia poresperanta agado kaj skribas al ni :

...Ni veturis al Grésillon, kie ni restadis dum unu semajno fine de Julio. Ni retrovis simpatian kaj studeman etoson kun samtempe la agrablan impreson de Anĵua libertempo. Kvindeko da ĉeestantoj, konataj aŭ ne, Francoj el diversaj regionoj aŭ alilandanoj, junuloj kaj maljunuloj svarmis aktive en la kastelo...

## SEMAJN-FIN-STAGOJ

POR LERNI INTENSE DUM 2 aŭ 3 TAGOJ

1a Staĝo en NANTES 5a kaj 6a de Februaro 1994
de Sabato je la 13a30 gis Dimanco je la 17a h

2a Staĝo en LE POULIGUEN (apud LA BAULE) 21a 22a,23a de Majo 1994
de Sabato je la 13a30 gis Lundo je la 17a

Diversnivelaj kursoj

Kontaktu :ESPERANTO 44
Anita CORTES
5 bis rue Appert 44100 NANTES Tél. 40693243

# RENKONTIĜO KUN RUSIO

Dum la pasinta feria tempo,kun mia amikino Marie-Line Jourdaine, mi vizitis mian korespondantinon Lilja en Rusio.Si loĝas en Sankta Peterburgo.

Dum nia vizito, la esperantista grupo de la urbo akceptis nin. Ilia akcepto estis tre elkora. Iu amikino Ludmilja gvidis nin kiam ni iris al fortikaĵo Petro kaj Paŭlo, kaj al Izaak-Katedralo. Iu alia Natalja , invitis nin por vespermanĝi; ni estis ankaŭ akceptataj ce Nastja, junulino kiu parolas Esperante kaj Franclingve. Ni vizitis ankaŭ Barbara,la plej fama esperantistino de Sankta Peterburgo kaj sian filinon Valerija.

Sankt-Peterburgo estas mirinda urbo. La Placo de Palacoj restis tiel kiel la Tsaro konstruigis gin. Laŭlonge de ĝiaj stratoj estas belegaj palacoj kun koloraj fasadoj. Iam ili estis loĝejoj de nobeluloj ;nun ili estas oficejoj de administracioj.

La urbo estas konstruita sur rivero Neva. Ĉiam, ĉie, ni vidas riveron aŭ kanalojn; en tiu urbo, estas 500 pontoj !

En la urbo, estas multe da muzeoj, sed la fama " Ermitaĝo " estas la plej granda kun eksterordinaraj kolektoj. Estas tre famaj kaj belegaj pentraĵoj, ĉe de francaj pentristoj.

Estas ankaŭ multaj ĝardenoj. La "Somera ĝardeno" estas tre agrabla kun multaj statuoj.

Krome, estas historia urbo; ofte ni memoras ke Napoleono la Unua venis ci-tien. En Kazan-katedralo estas entombigita Generalo Kutuzov; estas memoraĵoj de la Rusa militiro...kompreneble!

Tra la urbo, estas multaj katedraloj kun oraj kupoloj kaj multaj koloroj ; ankaŭ multaj teatroj (190), ekzemple Kirov Teatro tre fama por baletoj.

Ni vizitis ankaŭ Moskvon kie loĝas la fratino de Lilja. Ni vidis Kremlinon kun ĝiaj kvar katedraloj, straton Arbat kie oni nur piediras. Ni ĉeestis plurajn spektaklojn el kiuj unu en cirko (fama Moskva Cirko).

Por ni Sankt-Peterbugo estas pli belega ol Moskvo.

Bedaŭrinde, la taga vivo ne estas facila. Estas longaj vicoj antaŭ magazenoj. Kvankam manĝaĵoj kaj diversaj varoj estas troveblaj en vendejoj, la loĝantoj ne povas ilin aĉeti car tro multekostaj.

Estis tre interesa kaj agrabla vojaĝo. Nun,mi havas nuran ideon : denove iri al Sankt-Peterburgo, sed dum vintre !

Chantal MILLET

Grupo de Grand Quevilly 76

# ESPERANTO-KONGRESOJ 1994

79a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO ( UEA) okazos en Seulo ( Koreio)de 23a gis 30a de Julio 1994.

Tra sia tuta vivo UK okazis nur dufoje en Azio : Tokio en 1965 kaj Pekino en 1986. Tial, la79a Universala Kongreso de Esperanto en Seulo estos grava momento por la plua enradikigo kaj disvolviĝo de Esperanto en Azio. Ĝi estos pli facile atingebla por aziaj esperantistoj, por kiuj ofte malfacile estas kongresi pro longa distanco. Ĝi ankaŭ kontentigos neazianojn, kiuj sopiras travivi ekzotikan etoson de fora lando dum sia esperantista vivo.

La kongreso okazos en la luksa hotelo Sheraton Walker Hill, kiu pitoreske situas montpiede en la orienta parto de Seulo. Ĉirkaŭ la kongresejo, troviĝas ankaŭ modestaj hoteloj.

Antaŭ-kaj post-kongresaj ekskursoj kondukos vin al la plej famaj turismejoj

Unuiĝo Franca por Esperanto (UFE) 4 bis rue de la Cerisaie 75004 Paris estas la peranto por UEA kongreso.Petu de gi aligilon.
Kongreskotizoj por UEA membro estas 730 F, por ne-membro 915 F gis la 31/12/93
France-Esperanto (UFE) organizas 2 karavanojn

67a KONGRESO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA okazos en Straẑnice (Ceĥa Respubliko) de la 16a gis 23a de Julio 1994.
Straẑnice " Perlo de Sudmoravia folkloro" situas en sudorienta parto de ĉeĥa respubliko,proksime de la limo kun Aŭstrio kaj Slovakio, en regiono kiun oni bone konas ne nur pro ĝia abunda kaj valora folkloro, sed ankaŭ pro produkto de tre bongusta vino.

Tranoktejoj komfortaj -ĉu en luksa tri-stela hotelo Flag ,-ĉu malplikoste en hotelo Interstudent (kun necesejo kaj duŝo en ĉiu ĉambro).

Antaŭ-kongreso okazos en Prago de 9a gis 16a de Julio kun turisma kaj kultura programo.
Petu informojn kaj aliĝilon ĉe SAT , 67 Avenue Gambetta 75020 Paris.

86a NACIA KONGRESO DE FRANCE-ESPERANTO (U.F.E.) okazos en Agde, "nigra perlo" de Langvedoko, apud Mediteranea Maro de 11a gis 15a de Majo 1994 ( ĉielirado).
Antaŭ la kongreso,disvolviĝos la kutima lingva staĝo; tiel eblos pasigi tutan semajnon en esperantista etoso.
ĉe programo,multaj ekskursoj kaj...vingustumadoj !
Petu informojn kaj aliĝilon ce UFE.

49a KONGRESO DE SAT-AMIKARO okazos en Esperantista Kulturdomo de urbo Baugé (Maine-et-Loire) dum Pasko 1994 .
Jen bona okazo por koni aŭ revidi Kastelon Grésillon.
Petu aliĝilon ce SAT-Amikaro (sama adreso kiel SAT).

Ni esperu ke multaj Normandoj partoprenos tiujn kongresojn.
Jam 2 samideaninoj de la grupo de Grand Quevilly aliĝis Universalan Kongreson !

# ABONOJ 1994

La lecture est le meilleur moyen pour progresser et enrichir son vocabulaire, en dehors des congrès et des rencontres internationales.
Demandez les catalogues de livres aux différentes associations espérantistes.
Vous pouvez aussi vous abonner aux nombreuses revues.Faites un cadeau à vos correspondants qui habitent dans des pays dont la monnaie est sans valeur ; offrez leur un abonnement.

Voici les principales revues :

| | |
|---|---|
| El Popola Ĉinio - 12 numeroj | 150 F |
| Esperanto (por ne-membro abonantoj de UEA) | 190 F |
| Eventoj - 24 numeroj | 205 F |
| Fonto (literatura revuo) -12 numeroj | 120 F |
| Franca Esperantisto (por ne-aktiva membro de UFE )- 11 numeroj | 180 F |
| Heroldo de Esperanto - 16 numeroj | 144 F |
| Kontakto (por ne TEJO membro) - 6 numeroj | 125 F |
| La Espero el Koreio - 6 numeroj | 82 F |
| La Kancerkliniko - 5 numeroj | 125 F |
| Literatura Foiro -6 numeroj | 165 F |
| Litova Stelo - 6 numeroj | 60 F |
| Monato (internacia magazino) - 12 numeroj | 210 F |
| Rok'Gazeto (pri muziko) -4 numeroj | 100 F |
| Ruslanda Esperantisto - 12 numeroj | 48 F |

Cette liste n'est pas complète.
Faire un chèque pour chaque revue et l'adresser à:
U.F.E. 4 bis rue de la Cerisaie 75004 Paris
C.C.P. UFE 855-35 D Paris

Autres revues :

Le Travailleur Esperantiste 80 F
Fédération Espérantiste du Travail -115 rue Bérenger 92320 Chatillon
CCP 902-52F Paris

SAT Amikaro ( por ne membro) 160 F
André Sadier 22 Av.P.V.Couturier ND 93000 Bobigny
CCP 7658-05 C Paris

Sennaciulo (por ne membroj de SAT) 150 F
Sennacieca Revuo 40 F
P.Quillaud , 16 rue Lt Vaisseau Paris 76120 Le Grand Quevilly
CCP 1906-23 C Rouen

*La estraro de ESPERANTO-NORMANDIE (Union des Espérantistes de Normandie ) deziras al ĉiuj siaj legantoj kaj membroj :*

*agrablajn kaj ĝojajn finjarajn festojn*

ESPERANTO-NORMANDIE Communique:

Lors de la dernière campagne électorale, un de nos adhérents demanda à Madame Elisabeth GUIGOU, Ministre délégué chargé des affaires européennes, si elle était disposée à soutenir l'adoption d'une langue commune planifiée pour favoriser la communication entre les peuples d'Europe.
Confondant langue commune avec langue unique, Madame le Ministre exprima ses craintes de voir se constituer une Europe uniformisée et déclara *"qu'il fallait préserver la diversité linguistique européenne en favorisant chez les jeunes l'apprentissage précoce de plusieurs langues, ce que prévoit le programme Lingua financé par la CEE.*
Connaissant le niveau scolaire des élèves entrant en 6ème et sachant que l'anglais est "choisi" par plus de 80% d'entre eux,-sachant également que le programme d'enseignement ne prévoit aucune langue réellement conçue pour jouer le rôle de langue internationale ,-laissant ainsi le champ libre à l'anglais, -et à lui seul-,alors qu'il n'a pas les caractéristiques appropriées et qu'il privilégie les peuples anglophones,-on peut dire que la première conséquence d'une telle politique d'enseignement des langues est de préparer le terrain à l'aliénation linguistique et culturelle et à une vassalisation des mentalités par rapport à l'anglais.

Exception Culturelle au GATT, sommet récent de la francophonie: le Président Mitterrand y déclara: *"il serait désastreux d'aider à la généralisation d'un modèle culturel unique."* et il s'est demandé si *" ce que les régimes totalitaires n'ont finalement pas réussi à faire, les lois de l'argent alliées aux forces des techniques vont y parvenir."*

D'autre part ,Jean-François Deniau, spécialiste des questions internationales et européennes, ancien ministre de Valéry Giscard d'Estaing a déclaré dans un interview au Figaro du 30-8-93 *:"On ne peut plus continuer à ""**faire comme si**" pour le problème des langues européennes: 10 langues officielles ,théoriquement sur le même plan, c'est en fait le triomphe inéluctable de l'anglais, l'effacement du français. Il faut que notre diplomatie exige enfin dans tout nouveau pacte européen deux langues de travail, le français et l'anglais."*

J-F Deniau a en partie raison mais certains exigeront l'allemand et l'anglais parceque l'allemand est la langue la plus parlée en Europe. D'autres exigeront l'espagnol et l'anglais. Quant aux Slaves qui désirent entrer dans la CEE, ils exigeront le russe et l'anglais. Alors?..

Pour défendre la langue française, pour défendre la langue anglaise dans son intégrité, pour défendre les autres langues nationales et régionales, il faut disposer d'une langue politiquement neutre, dénuée d'attaches culturelles trop spécifiques, sans réference à un système idéologique ou religieux, ce qui est le cas de l'Espéranto.

Le linguiste et écrivain Umberto Eco répondait dans Le Figaro du 19 Août 93, au journaliste qui l'interrogeait au sujet de la langue européenne de demain : *"si on parle d'une langue internationale "véhiculaire", oui ce rôle est à présent joué par l'anglais. Mais il pourrait s'avérer que demain , dans une Europe unie, chaque pays refusant que la langue véhiculaire soit celle de l'autre, on arrive à accepter l'idée d'une langue véhiculaire artificielle...Elle est nécessaire, mais en même temps, il est nécessaire d'arriver à un plurilinguisme raisonnable. On ne peut pas passer son temps à apprendre toutes les langues, mais il faut acquérir une certaine sensibilité aux différents langages."*

C'est ce qu'ont toujours dit les espérantophones.

Et c'est pourquoi Esperanto-Normandie approuve la résolution adoptée lors du dernier Congrès National d'Espéranto :
- rappellant que l'enseignement de l'Espéranto comme première langue vivante fournit aux élèves un excellent moyen de communication et une base efficace pour l'étude des autres langues.
- demandant aux autorités politiques nationales de reconsidérer la politique d'enseignement des langues en France et de s'associer au niveau européen à toute tentative pour introduire l'Espéranto comme langue vivante étrangère à tous les niveaux de l'enseignement.

Pour tous renseignements , s'adresser à Espéranto-Normandie Tél. 35 69 66 09

# FRANCE-ESPERANTO KARAVANO :

N.B. Vojaĝo trans la eùropa plus azia kontinentoj estas jam baze sufiĉe kosta. Pro tio, ni suspektas, ke antaù ol aliĝi vi deziras havi ideon pri la kostoj. Pro tio ni tuj donas prognozon, sufiĉe precizan, kies nura necerteco ligiĝas al la valoro de la usona dolaro. La prezoj de la vojaĝo estas pagitaj en franca mono, do estas definitivaj, nur la ena parto pri gastigo, manĝoj kaj ekskursoj riskas etajn modifojn. La referenca dolarkurzo estas 6 FRF. Por interesi plimulton, ni memvole limigis al 17-taga maksimumo la proponojn.

***UNUA PROPONO* : (12-taga)**

Ekiro Merkrede 20-an de Julio (12h30 ĉe PARIS ROISSY). Alveno en Seùlo Jaùde 17h30.

Reveno Dimanĉe 31-an de Julio (en Roissy 19 h 10)

Tutan semajnon en la SHERATON WALKER HILL kie okazas la ĉefaj aranĝoj de la universala kongreso.

En la prezo entenatas

rekta flugo per AIR KOREAN (Parizo/Seulo/Parizo)
loĝado en duobla ĉambro, luksa kategorio
vespermanĝo ĉe la alvena tago 21-an de Julio,
tag- kaj vespermanĝo la vendredon 22-an de Julio,
usonaj matenmanĝoj ĉiujn tagojn.
transportoj kaj vizitoj en klimatizitaj aùtobusoj,
ekskursoj en kaj apud la ĉefurbo vendrede 22-an de Julio (palaco, muzeo, ĝardeno, sanktejo, bazaraj stratoj...)
helpo ĉe la flughaveno,
portado de bagaĝoj,
alvena koktelo,
vojaĝsako, gvidlibro pri Koreio.
asista-rehejmiga asekuro,
diversaj impostetoj

Bezonatas simpla pasporto ( plu valida ĝis 2.94)

Ne estas entenataj,

nuliga asekuro (2%)
trinkmono, trinkaĵoj, kaj individuaj elspezoj
flughavena imposto de 7.200 wonoj

Minimumo por tiu karavano : 20 partoprenantoj
Prezo : **13.900 FRF** Frua rezervo(°): **4.920 FRF**
Suplemento por unuopa ĉambro : **3.500 FRF** " **1.200 FRF**
**(La rezervoprezo entenas la nuligan asekuron)**

***DUA PROPONO* : (17-taga)**

Ekiro Merkrede 20-an de Julio( 19h30 ĉe Paris Roissy). Alveno en Seulo Jaùde 17h30.

Reveno Vendrede 5-an de Aùgusto (en Roissy 19h10)

Ekde alveno ĝis dimanĉon 31-an de Julio matene loĝado ĉe HOTELO SHERATON WALKER, la kongresejo, kie okazas plej multaj aranĝoj.

Vendrede 22-an de Julio, vizitoj en kaj apud la ĉefurbo (palaco, muzeo, ĝardeno, sanktejo, bazaraj stratoj...)

Sabate 23-an ĝis sabate 30-an inkluzive : vi mem profitas la aranĝojn de la U.K.

Dimanĉon 31-an de Julio :vojaĝo al folklora vilaĝo sude de Seulo, tiea tagmanĝo, daùrigo al Suwon, kaj Mont Sogni, vizito de Templo Popchusa. Vespermanĝo kaj tranokto en Hotelo SOGNISAN






# EK AL SEULO-U.K. 1994 !

Lundon 1-an de Aùgusto :vojaĝo al Haeinsa kaj ĝia 12-centjara templo; daùrigo al Kyongju, loka manĝado, daùrigo al Kyongju, vespermanĝo kaj nokto en HILTON hotelo.

Mardon 2-an de Aùgusto : vizito de Kyongju (antaùa ĉefurbo), mirado al grotoj, budaoj, 8-a jarcenta tombo, tagmanĝo survoje...Vespermanĝo kaj tranokto ĉe sama hotelo HILTON.

Merkredon 3-an de Aùgusto : vizito de la urba bazaro, de la Tumulis-parko kaj ĝia elstara elfosado de riĉaj reĝaĵoj, de astronomia observatorio. Loka tagmanĝo. Vizito de nacia muzeo. Daùrigo ĉe duonluna fortikaĵo Panwolsong, kaj Somerpalaco Anapchi. Reveno kaj vespermanĝo ĉe HILTON.

Ĵaùdon 4-an de Aùgusto: ekiro al PUSAN. Survoje vizito de templo Tongdosa (jaro 647a), kun ĝiaj 45 konstruaĵoj. En PUSAN, vizito de la fiŝbazaro. Loka tagmanĝo. Daùrigo ĉe Parko Yongdusan, supreniro al Panorama Turo. Vespermanĝo kaj tranokto ĉe Hotelo HYATT.

Vendredon 5-an de Aùgusto : transporto al flughaveno PUSAN kie komenciĝos la flugado ĝis Parizo tra Seulo (unuhora paùzo).

En la prezo entenatas

flugo Parizo/Seulo/Pusan Kimhae/Parizo per regula AIR KOREAN.
loĝado en duobla ĉambro, en unukategoria kaj unuaklasa citataj hoteloj (usonaj matenmanĝoj)
tag- kaj vespermanĝoj la unuan vendredon, kaj ekde dimanĉon 31-an ĉiuj manĝoj
transportoj kaj vizitoj en klimatizitaj aùtobusoj
flughavena helpado, transporto de bagaĝoj
asista-rehejmiga asekuro,
koktelo ĉe alveno,
vojaĝsako, gvidilo pri Koreio,
diversaj impostetoj

Bezonatas simpla pasporto (plu valida ĝis 2.94)

Ne entenatas

nuliga asekuro (2% de la entuta kosto)
trinkmono, trinkaĵoj, kaj individuaj elspezoj
flughavena imposto de 7.200 wonoj

Minimumo por tiu karavano :20 partoprenantoj
prezo : **18.900 FRF** Frua rezervo (°) **F.6.700**
Suplemento por unuopa ĉambro : **5.150 FRF** " **F.1.720**
(°) La rezervo entenas la nuligan asekuron.

***VI POVAS REZERVI ĈE NIA SIDEJO*** PER SUMO INDIKITA fronte al ĉiu prezo. Se estos 32 partoprenantoj por la 12taga karavano, ni rabatos ĉiun unuopan lastan fakturon je **600 FRF** ; se estos 32 partoprenantoj por la 17taga karavano, ni rabatos ĉiun unuopan lastan fakturon je **900 FRF**. Ni fermos la aliĝkaĵeron la 1-an de majo, se mankas sufiĉe da partoprenantoj, kaj tiam rehavigos al vi ĉiujn rezervosumojn.

Al ĉiu rezervanto, ni sendos iom pli detalan vojaĝkaĵeron, kaj detalfolion por la ceteraj pagoj. Vi kalkulu, ke la lastan fakturon ni devos enkasigi ĝis la 15-an de junio 1994.

Ni kuraĝis fari al vi tre fruan proponon, por helpi vian preparon. Bone komprenu, ke la akiritaj kondiĉoj, post selekto el inter pluraj agentejaj proponoj, entenas seriozecon, garantiojn, sperton, kaj plej tre decajn prezojn.